

Legantoletero

Eraroj pri la sufikso “-in”

Ne nur laŭ la regulo sed ankaŭ laŭ PIV la sufikso “-in” signifas, ke radikoj – aŭ eble plilongigita – tiamaniere indikas ŝanĝon al la virina, femala sekso, ekz. kuiristo → kuiristino, viro → virino, blondulo → blondulino. La plej klara eksplikado okazas ĉe la parencaj indikoj, kiel frato → fratino, aŭ patro → patrino. Malpermesigas interligaj indikoj kiel drato → dratino, ŝranko → ŝrankino; tio estas absurda, sen ia senco. Samnivele moviĝas provi elpiki la sufikson el vortoj, kie ĝi apartenas al la radikoj kiel morfemo (ekz. maŝino, rezino, ravino, drezino ktp.). Simile tio rilatas al la propraj nomoj. Senvole oni – precipe la germanoj – inklinas apliki la “-in”-metodon al virinaj propraj nomoj. Sed tio estas eraro; traserĉante PIV-on, oni trovas vane virinajn nomojn finiĝantajn per “-in” aŭ “-ino”. Ĉiuj tie troveblaj nomoj finiĝas per –a (Irena, Johana, Jozefa ktp*).

Unuflanke tiu ekzemplo demonstras, ke la sufikso “-in” ne estas aplikata al propra nomo, aliflanke ĝi ne povas indiki virinan sekson. Tion sole indikas la finaĵo “-a”, kvankam tio ŝajnas kontraŭi la regulon, ke la finaĵo “-a” kiel morfemo finas la adjektivon. Do, ĉu oni permesu tiun neregulaĵon, tian escepton, kiu kontraŭas la logikan esencon de Esperanto? Eble estas preferinde, rezigni pri PIV, kaŭzanta ĥaoson. Verŝajne la plej multaj esperantistoj inklinas uzi la virinan formon “-a” anstataŭ “-ino”; konsideru la formojn: Irenino, Johanino, Sofiino – kurioze, ĉu ne?

Speciala kazo rilatas al la vira nomo, precipe uzata por romiaj imperiestroj kiel ekz. Konstantino la Granda. Mi sentas vualece aŭ neplaĉe, tiun nomon transformi al Konstanteno, kiel en PIV. Ekzistas laŭ mia scio du kaŭzoj, ke mi malkonsentas: 1.) La vortpartiklo –in- kiel sufikso de virina sekso ne validas, ĝi estas tutlogike morfemo, parto de la nomo, ne instigante ian eraron. Se oni serĉas virinan formon, tiam ĝi tekstas *Konstanta* aŭ eble *Konstanca*. 2.) La urbo Konstantino sur la alĝeria bordo tute ne estas komparebla kun la imperiestro, des pli ĉar ĝi transprenis la nomon de la imperiestro. Origine ĝi nomiĝis *Kirtha* (fenica), poste *Cirta* (romia); imperiestro Konstantino la Granda ŝanĝis ĝian nomon al *Konstantine*. Oni konsideru ankaŭ, kiu nocio estas pli grava, tiu de la fama imperiestro, aŭ tiu de la fenica urbeto. Ĉiuokaze oni konsideru, ĉu la imperiestra nomo en PIV restu neŝanĝita, do origina Konstantino anstataŭ Konstanteno.

Gerhard KALKHOF (†)

* Redakta rimarko: Tiu procedo konsekvence, krom ĉe internaciaj radikoj (*Maria*, *Marta*, indikitaj kursive), estas forlasita en la nova PIV (2002, 2005).

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
Hejmapaĝo: <http://www.eventoj.hu/isae/>

Pres-indikaĵoj : ISSN 0048-9557.

Eldonanto: ISAE

Laserkopiita : Marto 2006

ĉe Copy & Co, Marktplatz 30, DE - 37269 Eschwege/Germanio

Responsa redakta teamo : La estraro de ISAE

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare

pagebla pere de via

a) landa peranto (resp. landa delegito)

aŭ rekte al

b) ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): [isae-z](mailto:isae-z@uea.nl) ^{*)} vd. sube

t. e. : vi pagu (anstataŭ al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en Köln, Germanio, kun indiko “ISAE-jarkotizo 2006 por UEA-konto isae-z”

Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	Libroservo AEA 143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	< Libroservo@ans.com.au >
Brazilo	Brazila Esperanto-Ligo (BEL) C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasilia	< bel@esperanto.org.br >
Britio	S-ro David Kelso 5, Craighenhill Rd., Kilncadzow GB - Carlisle, ML8 4QT	< davidekelso@yahoo.co.uk >
Finnlando	S-ino Heta Kesälä Kalamihenkuya 3 D 32, FI-4300 Tuusula	< heta.kesala@pp.inet.fi >
Francio	S-ro Charles Trébouet Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil	< trebouet.bohere@compagnet.fr >
Irlando	S-ino Joy Davies 9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	< noviresp@eircom.net >
Korea Resp.	S-ro Cho Sung Ho Biol.Fak.Inha Univ., KR Incheon 402-751	< shcho@inha.ac.kr >
Norvegio	Eldonejo Esperanto Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	< hara-ryg@online.no >
Pollando	S-ino Maria Majerczak ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków	< mamajer@interia.pl >
Svedio	S-ino Lisbeth Andreasson Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby	< bertil.andreasson@torby.mail.telia.com >
Usono	Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA) P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA	< elna@esperanto-us.org >

^{*)} Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendota Scienca Revuo) la eldonanton:

Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio
Tel./Fakso xx-49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>